# Jarraporto de la Komitato por Informado

Dum la 2006-2007 jarrraporto, la komitato faris tri agojn:

1) Je la instigo de Tim WESTOVER, Google Inc. donacis al ni grandan sumon de senkosta reklamkapablo. Ni komencis kampanjo por uzi ĝin. Uzi la tutan ĉiutagan buĝeton ($1000/tago) estas malfacila, ĉar Google limigas (en sia senkosta programo) la manieron al tre specifaj serĉvortoj. Spite de ĉi tiu, Robert L. READ, Steven BREWER, kaj Tim WESTOVER kreis kapanjon tiun, kiu elspezis proksimume $100 ĉiutage el la potenca buĝeto. Ni penis celi la serĉantojn al specifaj paĝoj kiam eblas.

En lasta monato, ĉi tiu programo senkoste donis al ni:

| | |
|---|---|
| 6,363 | vizitantojn |
| 1,025,178 | vidojn |
| 0.62% | de uloj, vidinte reklameto, tra-klakas gxin |
| $0.71 | la cxiu-klakinta kosto, ni pagus, se Google ne donacis ĝin al ni... |
| $4,539.06 | la tuta sumo ni elspezis, se Google ne donacis gxin al ni. |

La leganto notu ke la vorto "Esperanto" estas montrita al miliono de uloj ĉiumonate. Ses mil de ili muslklakis al nia retpaĝaro.

La komitato elkore dankas s-ro WESTOVER pro tiu.

2) Antaŭ decembro, d-ro Steven BREWER planis kaj aĉetis reklamon ĉe populara retpaĝaro, "boingboing.com", kontraŭ $300. Ĉi tiu ago portis pli ol 350 vizitantoj al nia retpagxaro, kaj probable montris la vorto "Esperanto" al multaj dekoj de miloj.

La komitato elkore dankas d-ro BREWER, pro ĉi tiu kaj lia helpo kun la Google kampanjo.

3) S-ro Hoss FIROOZNIA dezegnis belan, koloran reklamon, laŭ specifaj postuloj por la gazeto "The Amercian Prospect". Ni aĉetis ĝin kontraŭ $540 (kun ribato pro esti oficiala 501c3 almozfondaĵo). La reklamo estas celita por la julio-auxgusta edicio de "The American Prospect", kiu ankoraŭ ne estas eldonata je la tempo de ĉi tiu verko.

La komitato elkore dankas s-ro FIROOZNIA, pro tiu helpo.

Dum lastatempe tri-taga periodo, la vizitantoj al nia retpaĝaro devenis:

| | | |
|---|---|---|
| 30 | en/http://www.google.com/search?hl= ... | 2 hours 26 min ago |
| 29 | en/http://www.google.com/search?hl= ... | 2 hours 40 min ago |
| 23 | en/http://www.google.com/search?hl= ... | 1 hour 17 min ago |
| 19 | en/http://becxjo.blogspot.com/ | 18 hours 24 min ago |
| 18 | en/http://www.google.com/search?hl= ... | 2 hours 48 min ago |
| 16 | en/http://en.wikipedia.org/wiki/Esp ... | 17 hours 15 min ago |
| 14 | en/http://en.wikipedia.org/wiki/Esp ... | 10 hours 47 min ago |
| 13 | en/http://pacujo.net/esperanto/cour ... | 9 hours 21 min ago |
| 13 | en/http://www.google.com/search?hl= ... | 6 hours 17 min ago |
| 12 | en/http://www.google.ca/search?hl=e ... | 1 day 3 hours ago |

# Jarraporto de la Komitato por Informado - daŭrigita

| | | |
|---|---|---|
| 12 | en/http://www.google.com/search?hl= ... | 17 hours 12 min ago |
| 10 | en/http://www.esperanto.ca/kurso/in ... | 5 hours 25 min ago |
| 10 | en/http://www.google.com/search?cli ... | 13 hours 3 min ago |
| 10 | en/http://www.google.com/search?q=e ... | 1 hour 42 min ago |
| 9 | en/http://pakesperanto.mihanblog.co ... | 12 hours 35 min ago |
| 9 | en/http://my.yahoo.com/ | |

Oni povas rezumi ĉi tion: serĉoj per Google estas la ĉefa metodo per kiu ni retpaĝaro estas vizita, kaj la trilingvo "blogo" de Beĉjo: http://becxjo.blogspot.com estas la dua, kaj la vikipedio la tria. Ĉi tiuj statistikoj ŝanĝas ĉiutage, sed ĉi tiu estas kutima ekzemplo.

Je la printempo, la komitatestro ŝangis de s-ro D Gary GRADY al d-ro Robert L. READ.

Je la Kongreso en 2006, la estraro kaj membroj aprobis buĝeton de $3,000 por rekta reklamo de E-o. El ĉi tiu, ni elspezis $840. Estas mia intenco peti la saman buĝeton por la 2007-2008 jaro.

Per la sperto tiu, kiun ni akiris dum 2006-2007 pri ambaŭ la Google kampanjo, kaj la rekta reklamo, mi esperas ke ni povas saĝe elspezi la tutan buĝeton en la venonta jaro.

La baza plano ne ŝanĝis: elspezi la buĝeton por diversaj metodoj, por lerni kiel plej efiki uzi la monon. La metodoj tiuj, kiujn ni konsideris kaj konsideras, estas interreta reklamo, gazeta reklamo, kaj
rekta poŝto.

Robert L Read, Komitatestro